

— Restas *jur'* el *jurist'* de la Ekzercaro. Kiu el ambaŭ estas fundamenta?

La opinioj malsamas: S-ro Inĝ. J. R. G. Isbrucker skribas: „Estas vere, ke ni povas konsideri „*juristo*” kiel kunmetaĵon de „*jur'*” kaj „*-ist'*”, kaj tiam fakte „*jur'*” estas jam fundamenta.” ... Sed Prof. G. Waringhien diras: „*jurist'*” ne devas esti analizita en „*jur'*”: tre certe, en la ideo de Z. tio estis unu „fremdvorto” kiu estis malkomponita nur poste, kaj ne de Z. mem.”

Andreo ALBAULT.

408.92

E 3-5 : E 82E

LA ĜUSTA TEKSTO DE LA EKZERCARO

Komparante la tekston de la *Ekzercaro* entenata en la oka eldono de la *Fundamento* (1931) kun la teksto entenata en Wackrill (*Konkordanco al la Ekzercaro*, 1907), mi konstatis ke estas kelkaj diferencoj inter la du tekstoj: mi notis naŭ el ili. Ili estas tre diversaj en sia graveco, sed ĉiuj povas helpi por fiksi la ĝustan tekston.

Por ĉiu el tiuj naŭ diferencoj mi komparis kun la tekstoj liveritaj de du aliaj eldonoj de la *Fundamento*: la Greka (1907) kaj la Itala (1907).

Jen, koncize, la rezulto de tiu esploro. (Mallongigoj uzitaj:

8 = Oka Eldono de la *Fundamento*; W = Wackrill; G = Greka eldono; I = Itala eldono.

12-a ekzerco. 17-a frazo.

dudek sepa (8, G) *dudek-sepa* (W, I) (preferinda)

18-a frazo:

dudek dua (8, G) *dudek-dua* (W, I) (preferinda)

mil sepcent tridek dua (8, G, W) *mil-sepcent-tridek-dua* (I) (preferinda)

14-a ekzerco. 5-a frazo:

miljaron (W, G, I) *jarmilon* (8)

22-a ekzerco. 1-a frazo:

pura, ol akvo staranta (8, G, I) *pura, ol akvo, staranta* (W) (malbona)

33-a ekzerco. 8-a frazo:

Ni forte malestimas (8) *Mi forte malestimas* (W, G, I)

36-a ekzerco. 7-a frazo:

miaj frato kaj fratino (8) *mia frato kaj fratino* (W, G, I) (malbona)

(„*miaj*” estas grase presita en 8; „*mia*” estas ordinare presita en W, G, I.)

41-a ekzerco. 6-a frazo:

nekredeblan (8, G) *ne kredeblan* (W, I)

42-a ekzerco. 12-a frazo:

sanigilo, resanigi (8, G) *sanigilo, sanilo, resanigi* (W, I) (bona)

Andreo ALBAULT.

INDEKSO por Vol. 1-10 de *Scienca Revuo* laŭ BDK *)

de M. C. BUTLER

ENKONDUKO

Jen laŭpete indekso (laŭ mia *Klasifo de Esperantaj Temoj*) de artikoloj en *Scienca Revuo* (Volumoj 1-10).

Por ĝin kompreni aŭ kritiki, necesas sin turni al la klarigoj en la verko mem (pp. 3-7, 133-140), aŭ minimume al la klarigoj donitaj en S.R. 1 108 kaj 8 98. Ilin mi ne ripetos ĉi tie.

Devante klasifi tre detale 50 000 erojn por la Esperanta Biblioteko de la B.E.A., mi trovis kaj UDK kaj ĝian Sebertan modifon tute neadekvataj, kaj la proponitajn indicojn neoportune - eĉ ridinde - longaj kaj nepraktikaj. Cetere, por mil kaj unu detaloj ili faris nenian ajn provizon. Dum 40 jaroj mi do grade ellaboris la nunan klasifon.

Mi sekvis Seberton [laŭ lia *Modela Klasifiko* (pp. 6, 14, 18, 19) akorde kun la publikaĵo 91 (1908) de la Int. Instituto de Bibliografio], uzante 41 *internacia lingvo*, kaj 81 *internacilingva literaturo*. Por demandoj gramatikaj Dewey montriĝis pli taŭga bazo ol UDK. Mi nun rimarkigas simple:

(1) Por Esperanta lingvo kaj literaturo la precizaj indicoj estas = 12 kaj 812. Tamen, en la praktiko, = 1 kaj 81 plene sufiĉas. [Se iam ekzistus originala literaturo en alia i.l., la necesaj indicoj estas provizitaj.]

(2) 5 ŝajnas pli oportuna ol 001 por „scienco” (ambaŭ estas kritikeblaj, kiel tro aŭ nesufiĉe ampleksaj).

(3) Mi provizis indicojn uzeble koncizajn, tamen detalajn kaj klarajn. Ekz., por Teknikaj Terminoj en Esperanto, E 28 (anst. 001.4 = 089.2); por UEA, E 066 (anst. = 089.2 = 061.238 (100)); por *Scienca Revuo* 5(05)SR (anst. 001(05) = 089.2(100)). (Kiel meti tiun kombinaĵon surdorse de volumo?)

(4) La Biskosignoj (Klasifo p. 14) montriĝis tre oportunaj por ĉion ordigi laŭ dato de eldono. Ekz., E „1902” S4 = E en 1902 (verko eldonita en 1924). Tamen, ĉar ili ne provizas por datoj post 1999, oni povas ilin pridubi.

(5) Kompreneble estas dezirinde, ke ĉiuj bibliotekoj uzu UDK same. Mi ne proponas modifon de UDK, sed nur, por *Esperantaj Bibliotekoj*, klasifon detalan kaj adekvatan por temoj alie neklasifeblaj.

(6) Kiu do insistas konservi UDK tute senŝanĝe, povas agi kiel montrite ĉe *Klasifo* p. 7.

*) Ĉi tiu listo ne pretendas kompletecon.

01 Bibliografio

- 016 : 5(045) = 1
 016 : 5(045) = 1(52)
 016 : 5(05) = 1
 016 : 51(045) = 1(52)
 016 : 61(045) = 1(52)
 016 : 61(048.6) = 1(52)
 016 : E286
 025.4 : 412
 025.45
 026 : 5(06)ISAE
- Sciencaj artikoloj en E 2 94; 4 52; 7 144;
 10 105
 E sciencaj artikoloj en Japanujo 8 154
 E en sciencaj gazetoj 1 152; 10 105
 E matematikaj traktajoj en Japanujo
 3 59
 E medicinaj artikoloj en Japanujo 8 154
 E resumoj en Japanujo 5 75
 E teknikaj terminaroj 6 42
 Klasifo de E temoj 8 98
 Dekuma Klasado 1 8, 108; 8 98
 ISAE Biblioteko 10 119
- 1 Filozofio**
- 159.9(034)
 Psikologiaj terminoj 3 23
- 3 Sociologio**
- 33(034)
 335(05)SR
 Terminoj: ekonomio 3 27; 8 96
Sennacieca Revuo 4 36; 5 72, 160; 7 117;
 8 100; 9 159
- 4 Filologio**
- 4
 4-28(023)
 406/8
 41 : 656.7
 41(041)
 418.6
 418.8
 44-31
- Lingvistiko (en „Retoriko”) 3 38; 10 134
 Internacia semantiko 9 70
 Klasado de lingvoj 7 62
 Int. lingvo por aviado 3 83
Interlingvistiko kaj Esperantologio 2 80,
 113
Interlingue 8 5, 31
 IALA. *Interlingua* 7 16; 8 3, 5, 31/35;
 10 146/150
Grand dictionnaire Espéranto-Français
 10 135
- 5 Scienco**
- 5(03)
 5(034)
 5(05)SR
 5(05)ST
 5(06)ISAE
- Scienca kaj Teknika Terminaro* 9 117
 Sciencaj terminoj 1 104 (Vd. indeksojn)
Scienca Revuo 1 3, 7, 41, 121 (Vd. indeksojn)
Scienco kaj Tekniko 1 3; 2 117, 152; 6 39
 (Vd. indeksojn)
- | | | |
|----------------|-----------------|-------------------------|
| -12 Fondo | -262 Kotizoj | -445 Kasisto |
| -13 Statuto | -4 Administro | -474 Librotenado |
| -21 Membroj | -43 Jarkunveno | -475 Bilanco |
| -235 Delegitoj | -44 Oficistoj | -48 Komitatoj |
| -242 Sekcio | -444 Sekretario | -56 Servoj (traduka...) |
- 1 3; 2 117, 152; 6 39

- 5(082)
 51(034)
 53(034)
 539.1(014)
 54(03) = 1 = 2
 54(034)
 57/59(014)
 58(034)
 581.4(03)
 59(034)
 598.2(485)(03) = 1 = 397 = 71
- Sciencaj Studoj* 10 130
 Matematikaj terminoj 2 104, 143, 148
 Fizikaj terminoj 1 21
 Nomoj de elementaj korpuskloj 1 98
English-Esp.Chem. Dictionary 8 102
 Kemiaj terminoj 1 74, 111; 2 39; 3 27; 8 102
 E nomoj bionologiaj 7 43
 Botanikaj terminoj 4 120; 7 43; 9 120
 Plantmorfologia terminaro 10 2
 Zoologiaj terminoj 7 43
Nomaro de Svedaj birdoj 5 158

6 Scienco aplikata. Teknologio

- 611(048.6) = 1(52)
 611.314(014)
 621.3(014)
 621.3(03) = 1 = 397
 621.395.8.001.5 : 400.1
 628.9(03)
 629.13(03)
 632 : 635(034)
 635(485)(047.3) = 1
 656.6(03)
 667.6/.8(034)
 {69+72}(03) = 1 = 397
- Anatomiaj studoj en E resumo 6 117
 Dentnomoj 9 119
 Nomoj de kelkaj instrumentoj 1 98
Elektroteknika terminaro E-Sveda 5 159
 Radia eksperimento fonetika 4 135
Lumigosciencia vortaro 2 154
Aeronautika terminaro 2 116
Gardenpestoj (terminoj) 6 35
 Hortikulturaj esploroj 6 118
Marista Terminaro 2 116; 3 40
 Farbistaj terminoj 2 117, 150; 5 46
Konstruteknika terminaro 10 131

8 Literaturo

808.5

Retoriko 10 134

82/89 Literaturo alilingva

81-13 AUL
 81-18 BOU
 81-18 BOU
 81-182 „1887/1957”
 81-23 APP
 81-31-SZA
 81-31 SZI
 81-38 ROS
 81-38 ROS
 81-38 SZI
 81-48 DAL
 81-48 WAR
 81-58 : E063 „1948”
 81-9
 81-9(016.7)
 81.09

La infana raso 9 29
Cent ĝojkantoj 10 143
Kontralte 8 36
Esperanta Antologio 10 150
Jozefo 10 39
Vojaĝo al Kazohinio 10 138
Tiel okazis 10 143
El la maniko 7 153
Homoj kaj riveroj 9 158
Koko krias jam 8 36
Dialekto, dialektiko 9 29
Eseoj I 9 28
Somera Universitato 1 117
 Faka literaturo en E 3 128
 Faka lit. en E, Subteno 8 76
 Nia lingva kritiko 4 85

82/89 Literaturo alilingva

82-82 „10/17”

Angla Antologio I 9 155

83-31 EIC
83-34 MUS
84-18 BAU
84-38 VOL
869-22 MAC
884-16 MIC
892.46-32 ALE
895.6-38 AKU

El la vivo de netaŭgulo 10 137
La nekonatino 3 160
La floroj de l' malbono 9 32
Tri verkoj de Volter 9 32
Teatro 10 144
Sinjoro Tadeo 8 119
Al ĉiuj egale 8 37
La kapao kaj aliaj rakontoj 8 36

9 Geografio kaj Historio

91(05) GR
92 George, H.

Geografia Revuo 8 101
4 117

E: Esperanto en rilato al aliaj temoj

E : 008 E kaj kulturo (Socia lingvo) 8 1
E : 025.45 E literaturo en publikaj bibliotekoj 4 54, 121
E : 027(079.5) E kaj decimala klasifo 1 108
E : 172.4 E kaj paco 4 71, 73
E : 3 E kaj sociologio 3 44, 158; 4 16, 17, 152; 5 150; 8 83
E : 3(06) Komisiono pri E kaj sociologio 4 16, 17 (Vd. E : 3)
E : 341.16 E kaj Unesko 2 29, 153; 7 2
E : 378.12 E katedroj 2 83, 112, 156
E : 378.18 E kaj studentoj 4 47; 8 83, 85
E : 389.1 E kaj la metra sistemo 7 126, 131
E : 406/8 Klasigo de E laŭ strukturo 7 62
E : 41 E kaj interlingvistiko 2 80, 113
E : 492.4 Aspigo de Hebrea lingvo 2 42
E : 5 E kaj scienco; Vd. indeksojn; ankaŭ sub 01.
E : 5(016) Organizo de scienca servo 6 103
E : 5(049.1) Rezolucio pri E kaj scienco 9 34
E : 5(83) E kaj scienco en Argentino 8 82
E : 5(492) E kaj scienco en Nederlando 10 128
E : 523.44 E nomoj de astroidoj 2 78
E : 61 E kaj medicino 3 84
E : 621.3(03)=0 E kaj IEC-vortaro 1 160; 2 28, 153; 3 126
E : 667.6/.8(063) E ĉe kongreso de FATICEP 5 46
E : 91(4) E kaj Eŭropo 7 118

E 0/9 Esperanta movado

E 023=3 *E in der Tasche* 2 114
E 047 *La int. lingvo: Faktoj pri E* 7 36
E 05 ESP *Esperantologio* 1 119; 2 111; 3 80
E 05 NP *Norda Prismo* 8 100
E 061 Akademio de Esperanto 3 124
E 063 Universala Kongreso de E 8 71
E 066 UEA 3 122; 4 135, 149/151
E 066(058) *UEA Jarlibro* 3 40; 4 119
E 069(058.7) *Kiu estas kiu?* 10 145

E 071(016)
E 071.1 CED
E 077
E 093.0 : 063
E 096(013)

Kunordigo de E kursoj 5 134
Centro de esploroj kaj dokumentado 3 122
Instruo de E 7 14
Kvarlingva flugfolio por kongresoj 7 119
Ni uzu E-on 2 109; 3 82; 4 50

E(.) Loka historio de E

E (43-11)
E (437)
E (469)
E (485)
E (489)
E (519)
E (52)
E (82)

E en orienta Germanujo 8 71
E en Ĉeĥoslovakujo 8 154
E en Portugalujo 2 27; 3 130
E en servo al la Sveda stato 5 23
E en Danujo 6 40
Letero el Koreujo 4 132
E en Japanujo 8 154
E en Argentino 8 82

E 1/9 La Esperanta Lingvo

E 111
E 15 : 003.62
E 205.86
E 211
E 211.917
E 214(03)
E 215.2
E 216.912
E 221.7
E 221.8
E 223
E 224
.1 Internacieco 7 45
.19 Reguleco 7 46
.5 Koncizeco 7 46
E 225
E 229.21

Liternomoj 3 4, 60, 67; 4 144/6
Prononco de formuloj 1 23, 106
Propra genio de E 3 104
Lingva distribuo de E radikoj 9 107
Slavaj elementoj en E 9 92
Naŭlingva Etimologia Leksikono 3 80, 116
Gramatika strukturo (E : Angla) 9 6
Komparo (E : Sanskrito) 3 148
Neologismoj: kiam bezonataj? 10 114
Neologismoj: Averta 2 38
Fontoj de E 9 92
Principoj de selekto 7 103
.6 Klareco, Precizeco 4 122; 7 48
.9 Homogeneco 7 49

E 223.4 : E 3-11

Propoj pri vortradikoj 3 132
Relativa ofteco de lingvaj elementoj en E 10 67

E 25 ge
E 26-84
E 26 ad- 91
E 26 end
E 261 : 57/9
E 28

Gramatika karaktero de UV radikoj 9 111
8 47/9
Misuzo de *ec*, *ig*, *iĝ* 10 36
Uzo de *ad* 10 36
Oficialigo 4 46
Proponataj sufiksoj bionologiaj 3 28, 106
Diversaj teknikaj terminoj 3 130; 5 63; 6 42

E 28(017)
E 281

Evoluo de E terminoj 8 88
Principoj pri faro de teknikaj vortoj 4 48, 104

E 281 : 389.6 : 418.8

Internacia normigo de teknikaj terminoj 8 31, 34; 10 146

E 282.1
E 282.9
E 284

scienco : popola lingvo 7 42, 51, 53
vortoj el E radikoj 7 55
Popolaj nomoj 7 50

E 286	Teknikaj kaj sciencaj terminaroj en E 2 153; 6 42
E 3-1	Inventaro de Fundamenta kaj oficiala vorttrezoro 7 137
E 3-12	Eraroj en la Angla sekcio de UV 9 113
E 3-2	<i>Naŭlingva etimologia leksikono</i> 3, 80, 116
E 3-4	<i>Neoficialaj vortoj</i> 6 81; 7 24, 110
E 3 A/Z	Apartaj radikoj (Vd. indeksojn)
E 31	<i>Plena Vortaro</i> 7 77
E 4	Preskaŭ-homonimoj 5 63
E 41	Sinonimaj formoj 7 47
E 5(015)	Scienca teorio pri E 6 26
E 516.263	ree(n) 10 37
E 518.7-84	Misuzo de <i>plejeble</i> 10 37
E 553.2	Transskribo de propraj nomoj 4 103
E 587.21/.22	-ata : -ita 4 35, 36, 87-91
E 593.34	<i>kaj...kaj</i> 4 86
E 594-7	Proponitaj prepozicioj 2 14
E 594	<i>da, per, trans</i> 10 37
E 594.2	Prepozicio post la pasivo 2 14, 6 136
E 595 : 491.2	E korelativoj kaj Sanskrito 3 148
E 396.823	<i>ĉiu ajn</i> 4 87
E 822	<i>Teach yourself Esperanto</i> 9 30
E 823 WIN	<i>Post la kurso</i> 5 74
E 85	<i>Niko kaj Nina</i> 4 120
E 86	<i>Zamenhofs Legolibro</i> 5 80
E 86 FK	<i>Fundamenta Krestomatio</i> 7 79
E 985.6	<i>Lingva Ĝusteco</i> 10 35

Rimarkoj de la Redaktoro. Kiel atentemaj legantoj eble jam rimarkis, ekde n-ro 41 *Scienca Revuo* uzas paralele la Universalan Dekuman Klasifon (UDK) kaj la Dekuman Klasifon de Butler (BDK) por Esperantaj temoj.

Ankaŭ ekde tiu numero mi ŝanĝis la indicon por *Scienca Revuo* de 001(05) = 089.2(100) al 0/9(05) = 089.2(100), ĉar S.R. fakte kovras la tutan kampon de sciencoj, teknikoj, ktp., kaj tial 0/9 estas pli ĝusta ol 001. Mia opinio la indico 5, kiun uzas s-ro Butler, estas „anglismo”, ĉar en la angla lingvo „*Science*” signifas *natursciencon kaj matematikon*, dum por Esperanto mi pledas kontraŭ tiu praktiko: mi interpretas la vorton „*scienco*” tre larĝe, kaj S.R. atestas pri tio.

Tamen mi akceptas BDK laŭ la modelo de s-ro Butler.

Mia opinio tute ne necesas ke la klasifaj indicoj estu metebraj surdorse de volumo. En biblioteko libro estu trovebla, kaj tial sur ĝia dorso troviĝu nombro indikanta ĝian lokon en la biblioteko. La klasifaj indicoj troviĝu sur slipoj aŭ kartoj; ili servas la dokumentadon kaj referencas al verkoj kaj artikoloj pri la koncerna temo.

ATAKOJ KONTRAŬ GARDENPLANTOJ de D-ro Paul NEERGAARD

licenciato de hortikulturo, magistro kaj doktoro de agronomio kaj sekcestro ĉe Ŝtata Plantpatologia Servo, Kopenhago, krome membro de la Akademio de Esperanto

La unua libro aperinta en Esperanto:

pri GARDENKULTURO, pri PLANTMALSANOJ,
pri INSEKTOJ, pri DAMAĜAJ FUNGOJ.

La libro enhavas 234 paĝojn artpaperajn, kiuj enhavas 75 tekstfigurojn. Krome, la libro enhavas 9 kolortabulojn, kiuj sume enhavas 85 figurojn, do la libro

entute enhavas 160 bildojn!

Belege tuttote bindita, kun ora stampo kaj kolorpresita kovrilo, desegnitaj de la dana pentristo Mogens Zieler.

Prezo £ 1, afranko 9p.

Eldonita de
THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD, ANGLUJO

Mendebila ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando,
aŭ ĉe landaj kaj lokaj Libro-Servoj,

Profesoro ĉe la Agrikultura Kolegio de Okcident-Skotlando. D-ro
HUGH NICOL, Ph.D., F.R.I.C., F.R.S.E., en *Esperanto*:

Mi ne konas libron verkitan anglalingve kiu valoras siaspece la duonon de “Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj” La libro estas perfekta kiel presajo, ĝia lingvo estas senerara. Guebla de ĉiu — fakisto aŭ ne.

Cefĝardenisto ĉe la Ŝtata Ĝardeneksperimentejo en Alnarp. Sve-
dujo, S-ro CARL A. KLANG en *Svenska Esperanto-Tidningen*:

Tre malofte oni vidas tiel modernan, aktualan, belpresitan kaj seneraran faklibron Pri la enhavo mi konstatis, ke ĝi estas pli moderna kaj aktuala ol svedaj ĝardenlibroj, kiuj ĝis nun aperis.